

# 76-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso



Žilina, Slovakio

30a de Aprilo - 4a de Majo 2025

---

## Kongreslibro

---

okazanta sub la aŭspicio de

**Jozef RÁŽ**, ministro de transporto de la Slovaka Respubliko

**Peter FIABÁNE**, urbestro de Žilina

---



**La reloĵ ligas la landojn – Esperanto la popolojn**



## EL LA LETERO DE LA MINISTRO POR TRANSPORTO DE LA SLOVAKA RESPUBLIKO

Vážená pani Feifičová,

v nadväznosti na Váš list vo veci žiadosti o prevzatie záštity nad pripravovaným podujatím 76. kongres Medzinárodnej železničiarkej esperantskej federácie IFEF Vám oznamujem, že Ministerstvo dopravy Slovenskej republiky záštitu nad uvedenou aktivitou rado prevezme.

Zároveň mi dovoľte popriať Vám úspešný a plynulý priebeh podujatia a dosiahnutie predpokladaných výsledkov.

Súctou

Jozef RÁŽ  
minister dopravy Slovenskej republiky

Bratislava, 2025 03 17

Estimata sinjorino Feifičová,

lige al via letero pri la peto transpreni la aŭspicion de la preparata aranĝo – la 76-a kongreso de la Internacia Fervojojista Esperanto-Federacio IFEF mi informas vin, ke la Transportministerio de la Slovaka Respubliko aŭspicion super la menciita aktivaĵo volonte transprenos.

Samtempe, permesu al mi deziri al vi sukcesan kaj glatan pason de ĉi tiu evento kaj atingon de atendataj rezultoj.

Estimplene

Jozef RÁŽ  
ministro de Transporto de la Slovaka Respubliko



MINISTERSTVO  
DOPRAVY  
SLOVENSKEJ REPUBLIKY



## SALUTVORTOJ DE LA URBESTRO



Mesto Žilina

Vážené účastníčky, vážení účastníci kongresu,

s veľkou radosťou vás vítam v Žiline a teší ma, že práve toto medzinárodné podujatie si za miesto svojho stretnutia vybralo naše mesto. Je pre nás ct'ou hostiť podujatie, ktoré už od roku 1949 spája odborníkov, nadšencov a priateľov železníc naprieč krajinami i jazykmi.

Vaša činnosť je dôkazom, že spoločný jazyk dokáže prepájať nielen ľudí, ale aj profesie, kultúry a hodnoty. Vzájomná spolupráca, odborná výmena a environmentálne témy, ktorým sa budete počas programu venovať, majú veľký význam nielen pre svet železníc, ale aj pre spoločnosť ako celok.

Verím, že popri odbornej práci budete mať možnosť spoznať aj naše mesto i región a že si z tohto kongresu odnesiete inšpiratívne podnety, nové priateľstvá a pekné spomienky na Žilinu.

S úctou a práním úspešného kongresu,

Peter FIABÁNE  
primátor mesta Žilina

Karaj gepartoprenantoj de la kongreso,

kun granda plezuro mi bonvenigas vin en Žilina kaj ĝojigas min, ke ĉi tiu internacia aranĝo elektis nian urbon kiel sian renkontiĝejon. Estas por ni honoro gastigi eventon, kiu jam ekde la jaro 1949 kunigas spertulojn, entuziasmulojn kaj fervojamikojn trans landoj kaj lingvoj.

Via agado pravas, ke komuna lingvo povas ligi ne nur homojn, sed ankaŭ profesiojn, kulturojn kaj valorojn. La reciproka kunlaboro, profesia interŝanĝo kaj mediaj temoj, kiujn vi traktos dum la programo, gravas ne nur por la fervoja mondo, sed ankaŭ por la socio kiel tuto.

Mi kredas, ke apud via faka laboro, vi havos eblecon ekkoni ankaŭ nian urbon kaj regionon kaj ke vi kunportos el tiu ĉi kongreso inspirajn ideojn, novajn amikecojn kaj belajn rememorojn pri Žilina.

Kun respekto kaj deziroj de sukcesa kongreso,

Peter FIABÁNE  
urbestro de la urbo Žilina



## **SALUTVORTOJ DE LA ĜENERALA PREZIDANTO DE FISAIC**



Sprache ist mehr als nur ein Mittel zur Kommunikation – sie verbindet Menschen, Kulturen und Ideen. Esperanto wurde mit genau diesem Ziel geschaffen; eine Brücke zwischen den Sprachen zu sein, eine neutrale, leicht erlernbare und gerechte Möglichkeit der Verständigung für Menschen aus aller Welt.

Seit seiner Entstehung hat Esperanto Generationen von Sprechern inspiriert, Reisen erleichtert, Freundschaften ermöglicht und weltweite Gemeinschaft geformt. Es ist ein lebendiges Beispiel dafür, dass eine gemeinsame Sprache nicht auf Kosten der Vielfalt gehen muss, sondern vielmehr fördern kann.

All diese Werte teilt es mit unserer Organisation der FISAIC (internationalen Vereinigung der kulturschaffenden EisenbahnerInnen)

Als Generalpräsident der FISAIC danke ich allen Verantwortlichen und Organisatoren für die Durchführung dieses Kongresses und wünsche allen Teilnehmern einen erfolgreichen Verlauf und gutes Gelingen.

**Kurt NEUWIRTH**  
FISAIC Generalpräsident / General  
president de FISAIC

Lingvo estas pli ol nur komunikilo – ĝi ligas homojn, kulturojn kaj ideojn. Esperanto estis kreita kun ĝuste tiu ĉi celo; por esti ponto inter lingvoj, neŭtrala, facile lernebla kaj justa interkomprenigilo por homoj el la tuta mondo.

Ekde sia ekesto, Esperanto inspiris generaciojn da parolantoj, faciligis vojaĝadon, ebligis amikecojn kaj formis tutmondan komunumon. Ĝi estas vivanta ekzemplo de tio, ke unu komuna lingvo ne devas postuli kostojn de diverseco, sed multe pli povas antaŭenigi ĝin.

Ĉiujn ĉi tiujn valorojn ĝi dividas kun nia organizo, FISAIC (Internacia Federacio de la Artaj kaj Intelektaj Fervojistaj Asocioj).

Kiel Ĝenerala Prezidanto de FISAIC, mi dankas al ĉiuj respondeculoj kaj organizantoj por efektivigo de ĉi tiu kongreso kaj deziras al ĉiuj partoprenantoj sukcesan pason kaj bonan sukceson.

**Kurt NEUWIRTH**  
Ĝenerala Prezidanto de FISAIC



## **SALUTVORTOJ DE LA IFEF- PREZIDANTINO**



Žilina, foje nomata la "perlo sur la Váh", kie invitis nin kongresi ĉi-jare la slovakaj geamikoj, estas tre alloga urbo ne nur pro sia historia kerno, sed ankaŭ ĉar la pozicio norde de la ĉefurbo Bratislava donas al la plej multaj kongresanoj la eblecon traveturi grandan parton de la kongreslando, tiel ke survoje oni povas admiri belegan naturon kaj grandan nombron de pitoreskaj vidindaĵoj.

Unu el la plej grandaj urboj en Slovakio, Žilina estas nuntempe grava administra, ekonomia, kaj kultura centro. Pro sia geografia pozicio, ekde la jaro 1870, kiam venis la unua vaportrajno el la moravia urbo Těšín laŭ la fervojlinio finkonstruita ĝis al Košice, Žilina disvolviĝis kiel grava fervoja nodo.

La universitataj fervojtrafikaj fakoj kaj ankaŭ la disvolviĝo de la fervojtransportoj faciligis la aperon de fervojistaj esperantistoj surloke, kiuj fondis en 1989 la Fervojistan Sekcion ĉe Slovaka Esperanto Asocio. En 1995 tiu iĝis memstara Slovaka Asocio de Fervojistoj Esperantistoj – SAFE.

Dum jaroj ege aktiva membro de IFEF, la slovakia asocio gastis ĝis nun la Internacian Fervojistan Kongreson en la orientslovakia urbo Košice en la jaro 1997, du postkongresojn (Žilina, 1991 kaj Tatranská Lomnica, 1997), du skisemajnojn (Vrátňa-valo, 1992 kaj Tatranská Lomnica, 2001).

Al la eventoj, jam organizitaj fare de SAFE, algluiĝas ankaŭ nia nuna aranĝo, kiu proponas riĉan kaj diversflankan programon (fakan, kulturen kaj turisman) pere de la dumkongresaj prelegoj, vizitoj kaj artaj vesperoj.

Tio, kio ĉefe ĝojigas, estas la daŭrigo de la komuna laboro farita de pluraj esperantaj organizoj. Krom la lokaj esperantistoj, ĉefe nia kara kolegino Magdaléna FEIFIČOVÁ, ni ŝuldas dankojn pro la invito en Slovakio al la spertaj organizantoj el E@I – Edukado ĉe Interreto.

Emocie, pro la lastaj salutvortoj kiel prezidantino de IFEF (post dekkvin jaroj en tiu ĉi posteno), nome de mi kaj de la estraro mi kore kaj sincere dankas al ĉiuj organizantoj kaj mi certas, ke tiu 76-a IFEF-kongreso plifortigos nian "familian fakan rondon" kaj estos ĝojplena por ĉiuj ĉeestantoj.

Sukcesplenan kongreson en Žilina, en bela Slovakio!

Rodica TODOR  
prezidantino de IFEF




Magdaléna  
FEIFIČOVÁ




Peter  
BALÁŽ



Dorota  
RODZIANKO



Sonja  
ZARETSKAIA



Théophile  
RACLOT

## SALUTOVORTOJ DE LA LKK

Karaj gepartoprenantoj de la 76a internacia fervojista kongreso, sincere kaj elkore ni denove bonvenigas vin en nia subtrata lando, ĉi-foje en ĝia nordokcidenta, en la kvina plej granda slovakia urbo – Žilina. Kelkaj el vi jam povis sperti belecon kaj gastamecon de nia lando dum du Internaciaj Fervojistaj Esperanto-Skisemajnoj, dum la 49-a IFK en Košice kaj dum la postkongresoj post la IFK-oj en Olomouc kaj Košice. Pli multo ja tamen venas kun scivolo, kion ĉi malgranda lando prezentos al vi.

La Loka Kongresa Komitato kun siaj surlokaj helpantoj klopodos, ke vi ne bedaŭru vian alvenon. Tion, kion ni sukcesis por vi prepari, ni prezentas al vi en sekvaj paĝoj de ĉi kongreslibro. Kaj kredu, ke ni tion faris kun amo en la koroj kaj kun ununura deziro, ke vi sentu vin en nia bela Slovakio bone, agrable, ĝojplene. Ni faris ĉion eblan, por ke vi dum la 76-a IFK bonsentu.

Bonvolu permesi al ni deziri al vi ĉiuj agrablan kaj rezultoplenan 76-an Internacian Fervojistan Kongreson en Žilina 2025!

Magdaléna FEIFIČOVÁ, SAFE-prezidantino



Bonvenon en Slovakio ankaŭ nome de E@I – la ĉefa logistika organizanto de la ĉi-jara IFEF-kongreso! E@I (ankaŭ konata kiel „Edukado@Interreto“) tre ĝojas, ke esperantistoj-fervojistoj decidis kongresi en Slovakio – lando, kie E@I havas jam dum 20 jaroj (ekde la 14-a de novembro 2005) sian sidejon. Ni do festos ĉi-jare 20-jariĝon de E@I kaj la IFEF-kongreso estas bela antaŭfesto de tiu evento. E@I ja specialiĝas pri organizado de edukaj eventoj (kaj aldone kreado de edukaj retejoj), do espereble ankaŭ la IFEF-kongreso estos sukcesa konfirmo de tiu ĉi nia specialiĝo. Se vi volus scii pli pri nia agado, vi povas legi multon en [www.ikso.net/eo](http://www.ikso.net/eo). Kaj fine nur permesu deziri al vi ĉiuj: ĝuu la kongreson, ĝuu Slovakion, ĝuu Esperanton!

Peter BALÁŽ, kunordiganto de E@I

## SLOVAKIO

**Slovakio**, oficiala nomo Slovaka Respubliko, **historie apartenis** al la Grandmoravia Imperio, Hungara Reĝolando, Slovaka Ŝtato kaj Ĉeĥoslovakio.

Nuna Slovaka Respubliko **estiĝis la 1-an de januaro 1993**. Gvidas ĝin Parlamento, nuna prezidanto estas Peter Pellegrini.

Ĝia **flago**, meze de horizontalaj blanka, blua kaj ruĝa strioj, enhavas la slovakon blazonon – blankan dustrekitan krucon sur tri bluaj montoj en ruĝa fono. Ĝia **himno** nomiĝas *Nad Tatrou sa blýska* (Super Tatro fulmas).

**Oficiala lingvo** de la ŝtato estas la slovakaj lingvoj. Krome estas parolata la ĉeĥa, hungara (en la suda Slovakio vivas preskaŭ duonmiliono de hungaroj (laŭ la stato en la jaro 2021) germana, pola, romaa lingvoj, kaj lastatempe ankaŭ la ukraina lingvo.

La ĉefurbo **Bratislava** proksimas translime kun aŭstra Vieno kaj hungara Budapeŝto.

Post sia sendependiĝo ekde la 1-a de januaro 1993 la lando enkondukis kiel sian monunuon slovakon kronon, sed de post la 1-a de januaro 2008 estas ĝia oficiala monunuo **eŭro** (la kurzo estis fiksita je 30,126 kronoj kontraŭ 1 eŭro). Slovakio eniris la **Eŭropan Union** en la jaro 2004. Krome ĝi **membras** en pluraj internaciaj organizoj kiel NATO, UNO kaj Viŝegrada grupo.

Slovakio troviĝas en la **horzono** MET (UTC+1) kaj ekde marto ĝis oktobro uzas someran tempon MEST (UTC+2).

Slovakio **situas** meze de Eŭropo. La **geografia mezo de Eŭropo** situas meze de Slovakio, ĉe Kremnické Bane (GPS: N48°44'38" E18°54'48").

Slovakio **najbaras** kun Ĉeĥio (okcidente), Pollando (norde), Ukrainio (oriente), Hungario kaj Aŭstrio (sude).

La lando **areas** 49 035,0 km<sup>2</sup>, havas 5 449 270 da **enloĝantoj** kaj la **denseco** de loĝado estas 111,13 loĝ./km<sup>2</sup>

La lando konsistas el ok **regionoj**: Banská Bystrica, Bratislava, Košice, Nitra Prešov, Trenčín, Trnava, Žilina kaj aldone ekzistas 79 distriktoj kaj tradiciaj regionoj.

En Slovakio troviĝas 2 891 municipoj, el kiuj 138 estas urboj. Nur dek urboj havas pli ol 50 000 loĝantojn. Al la **plej grandaj urboj**, laŭ la stato en la jaro 2021, apartenas Bratislava (475 503 enloĝantoj), Košice (229 040 enloĝantoj), Prešov (84 824 enloĝantoj), Žilina (82 656 enloĝantoj), Nitra (78 489 enloĝantoj). La **malplej granda civito**, kun nulo



da enloĝantoj, estas mitila distrikto Valaškovce, kaj vera civito Příkra havas nur 12 enloĝantojn.

Al la plej grandaj **montaroj** de la lando apartenas Vysoké a Nízke Tatry (Altaj kaj Malaltaj Tatroj), Veľká a Malá Fatra (Granda kaj Malgranda Fatroj) kaj Slovenský Raj (Slovaka Paradizo).

La **plej alta punkto** – Gerlachovský štít (2 655 m super la maro) – situas en Altaj Tatroj. La **plej malalta punkto** – Streda nad Bodrogom (94 m super la maro) – troviĝas en la punkto, kie la rivero Bodrog elfluas el slovakia teritorio al Hungario.

Tra la lando fluas ok **riveroj**: Bodrog, Dunaj (Danubo), Dunajec, Hornád, Morava, Poprad, Tisa kaj Váh, kiu estas la plej longa slovakia rivero.

Al la **kultura heredaĵo de UNESKO** apartenas la iama arĝentmineja urbo Banská Štiavnica kaj ĝiaj teknikaj monumentoj; urbo Levoča, kastelo de Spiš kaj ĉirkaŭaj monumentoj; popola arkitekturo de la ankoraŭ ĉiam loĝata foklora vilaĝo Vlkoľínec; historia centro de la urbo Bardejov; lignaj temploj en la slovakia parto de la Karpata Arko; okcidenta segmento de la limoj de la Romia Imperio – Danube Limes.

Al la **nemateria kultura heredaĵo de UNESKO** apartenas la muzikilo fujara kaj ĝia muziko; muziko el Terchová; sakŝalma kulturo; marioneta arto en Slovakio kaj Ĉeĥio; polifonia kantado de Horehronie; blupreso; dratumista arto; falkoĉaso – vivanta heredaĵo de la homaro; tradicioj ligitaj kun la bredado de Lipican-ĉevaloj.

Al la **natura heredaĵo de UNESKO** apartenas kavernoj de Slovaka Karsto kaj Karsto Aggtelecký kaj malnovaj fagarbaroj kaj fagaj praarbaroj de Karpatoj.



*La pendtelfero al la Lomnica-montopinto*

## KONGRESURBO ŽILINA

**Žilina** [*ŝilina*], latine Solna, germane Silein, hungare Zsolna, pole Żylina, estas urbo en la nordokcidenta Slovakio etendiĝanta precipe sur maldekstra bordo de la plej longa slovakia rivero Váh.

Žilina situas en la **alteco** 378 m s. m. sur la **areo** 80,03 km<sup>2</sup>. Laŭ la nombro de la enloĝantoj – 80 634 civitanoj (stato al 31. 12. 2023) – Žilina situas sur la kvara loko. Loĝas en ĝi preskaŭ senescepte slovakoj kaj la nombro de aliaj minoritatoj estas ege malalta. **Denseco** de la loĝigo estas 1 007,55 loĝantoj al km<sup>2</sup>.

Apartenaĵo de Žilina estas la **kastelo Budatín**, kuŝanta apud la **kunfluejo** de la rivero Kysuca kaj Váh, al kiu iom pli sude aldoniĝas ankaŭ la rivero Rajčanka. **Tipa por la urbo** estas rigardo al la Katedralo de la Plej Sankta Triunuo kaj la balustrado sub ĝi, kaj tiu vido ricevis la nomon Hradčany de Žilina (Hradčany nomiĝas fama kastelo de Prago).

Nuntempe la urbo Žilina estas administra, ekonomia, trafikaj kaj kultura **centro de la nordokcidenta Slovakio**.

La urban **blazonon**, kiu apartenas al la plej malnovaj urbaj blazonoj de Slovakio, kreas oliv-verda ŝildo, sur kiu kuŝas orkoloraj bizandevena dustrekita kruco kun radikoj kaj du steloj.

**Ĝemelurboj de Žilina:** ĉina *Ĉangĉuno*, franca *Nanterre*, belga *Essen*, pola *Bielsko-Biala*, rusa *Krasnojarsk*, serba *Kikinda*, ukraina *Dnipro*, ĉeĥaj urboj *Frydek-Místek*, *Plzeň*, *Praha 15* kaj *Třinec*.

## EL LA HISTORIO

La **plej malnova skriba mencio** pri Žilina devenas el la jaro 1208, kiam la urbon prezentis kelkaj slovakaj civitoj en proksimeco de la preĝejo de Sankta Stefano en la nuntempa urboparto Závodie. La plej granda civito verŝajne troviĝis sur la loko de la nuntempa historia kerno de Žilina. Apartenis al ĝi ankaŭ la preĝejo kun duonronda apsidio, fundamento de kiu estis trovita sub la Katedralo.

La estontan urbon Žilina komencis konstrui **germanaj koloniistoj** el Silezio antaŭ la jaro 1300. Ĝia kerno fariĝis la t.n. *řinok*, kio estis la urboplaco kun foirejo, troviĝanta sur la areo de la nuntempa Placo de Maria. La unua mencio pri **Žilina kiel urbo** devenas el la jaro 1312. La plej malnova konata **stampilo** kun blazono de Žilina devenas el la jaro 1379.

En la jaro 1381 la slovakaj civitanaro superis la nombron de germanaj koloniistoj kaj per la deklaro *Privilegium pro Slavis* estis kun ili samrajtigita kaj en la urbestro devis esti duono de slovakoj kaj duono de germanoj.

El tiu ĉi epoko devenas ankaŭ la t.n. **Urba Libro de Žilina** kun 149 paĝoj en leda kovraĵo, enhavanta traskribon de la magdeburga leĝo, mastrumadajn kaj juĝejajn enskribojn kaj protokolojn de urba konsilantaro. La unua slovaklingva enskribo en ĝi estas el la jaro 1451, la lastaj enskriboj devenas el la jaro 1561. Tiu ĉi grava literatura kaj jura memoraĵo estas la plej malnova kaj plej grava lingva kaj jura memoraĵo de Slovakio kun mezeuropa signifo.

En la **jaro 1998** oriente de Žilina oni finkonstruis Akvoverkon Žilina kun akvoelektrejo, kaj tiu areo nuntempe servas por urbaj sportemuloj ne nur somere, sed ankaŭ vintre la longskiantoj povas eluzadi ĝian digon. En la sama jaro komencis en la urbo trafiki trolebusoj.

En la jaro 2000 estis kreita **eŭropregiono Beskydy**, kiu inkluzivas sudon de Pollando, nordan Moravion, orienton de Silezio kaj nordon de Slovakio. Ties celo estas subteno de la translima kunlaboro en la menciita areo.

## **KULTURO**

En Žilina estas kelkaj **muzeoj**, ekz. **Muzeo de Juda Kulturo** aŭ **Muzeo ĉe Váh** kun sidejo en la Budatín-kastelo, kie krom la arkeologiaj ekspoziciaĵoj kaj ekspozicio el la historio de la urbo estas unika **dratumista ekspozicio**. En la **Galerio de Arto ĉe Váh** estas ekspoziciataj artaĵoj ne nur de lokaj artistoj, sed ankaŭ de eksterlandaj. Ĝia konstanta ekspozicio prezentas la verkojn de la pentristo, grafikisto, ilustristo, skulptisto kaj pedagogo, reprezentanto de eskpresionismo, **Vincent Hložník**.

En la **Domo de Arto Fatra** regule okazas muzikaj prezentaĵoj. Tutslovakie kaj eksterlande famas **Ŝtata Kamera Orkestro** de mocarta tipo, ununura en Slovakio. En la urbo agas **folkloraj ensembloj** *Rozsutec*, *Stavbár* kaj *Odborárik*, kaj ankaŭ **Miksita Koruso de Žilina**.

En la urbo regule okazas **Kultura Somero**, kiu inkluzivas multajn kulturajn kaj sportajn okazantaĵojn; **Malnovurba Festo**; **Jašdielňa** – festivalo de kreado por handikapita junularo; Festivalo de animitaj filmoj **Fest Anča**; la plej granda slovak **karnavala festivalo**; **Literatura Festivalo**; Internacia Festivalo de **korusa kantado** *Voce Magna*.

Lokon por kulturaj kaj socialaj aktivaĵoj kaj nuntempa arto disponigas la civitana societo **Truc Spherique** en avantgarda areo de la fervoja stacio Žilina-Záriečie. En la sinagogo funkcias **Kunsthalle**. Libertempajn aktivaĵojn por infanoj kaj junularo el la urbo kaj ties ĉirkaŭaĵo proponas **centroj de libertempo** *Žirafa*, *Spektrum* kaj *Strom*. Krom la Urba Teatro estas en Žilina ankaŭ la **Pupteatro**, kiu apartenas al la plej belaj en Slovakio. En la urbo funkcias du **radio**-elsendejoj, tri **televido**j, estas eldonataj tri **semajngazetoj**.

## ***KLERIGADO***

En la jaro **1960** el Prago translokiĝis al Žilina la **Transporta Altlernejo** fondita tie en la jaro 1953, nuntempa **Universitato de Žilina** (Žilinská univerzita), kiu havas sep fakultojn. Ĝi havas ankaŭ propran Univesitatan Bibliotekon, evoluiĝanta jam de la 70aj jaroj.

## ***TRAFIKO***

Dank' al sia situo de komenco estas Žilina **kruciĝo de komercaj vojoj**. Jam en la jaro 1364 la hungaria reĝo Ludoviko la Unua Granda konstruigis la vojon el Košice al Považie.

La unua mencio pri **ponto trans la rivero Váh** ĉe Budatín devenas el la jaro 1438. La ponto ebligis pli bonan ligitecon ĉefe kun Silezio, kaj sekve kun la teritorio de Pollando, Ĉeĥio kaj Germanio, Ukrainio, suddirekte al Bratislava kaj tra valo de Rajec al Ponitrie.

Ĉar nombro de enloĝantoj konstante kreskis, en la jaro 1949 ekestis **urba publika transporto**, kiun priservis kelkaj aŭtobusoj sur unu veturlinio. En la jaro 1994 komenciĝis regula **trolebusa** trafiko.

La 20an de decembro **1870** venis el la moravia urbo Tešín laŭ la **fervojlino** finkonstruita ĝis Košice **la unua vaportrajno**. Rande de la urbo estis konstruita la fervojstacio, al kiu el la urbocentro estis konstruita *Železničná ulica* (Fervoja Strato), nuntempe nomata *Národná* (Nacia).

La **fervojtrafiko** en Žilina estas ege frekventita, ĉar ĉi tie kruciĝas la fervojlinioj E 42 kaj E 52, kiuj funkcias kiel internaciaj magistraloj. La ĵus rekonstruata fervojstacio troviĝas sur la linio de la paneŭropa koridoro n-ro 5. En la urbo kruciĝas la linioj 120 (Bratislava – Žilina), kie trafikas plej multe da rapidtrajnoj, 126 (Žilina – Rajec), 127 (Žilina – Mosty u Jablunkova) kaj 180 (Žilina – Košice).

En la urbo renkontiĝas tri **ŝoseoj de internacia graveco** E 50, E 75 kaj E 442. La urba ringo forigas la transiton ekster la urbocentron. La **aŭtoŝoseoj** D1 kunigas la ĉefurbon Bratislava kun la orientslovakia urbo Košice, el la aŭtoŝoseo D3 gvidas al la urbo la aldirektejo.

En la jaro 1935 estis konstruita la flughaveno ĉe la loĝkvartalo Vlčince, sed nuntempe Žilina eluzas la internacian flughavenon apud Dolný Hričov, funkcianta ekde la jaro 1975. Longeco de ĝia alteriĝejo estas 1 200 m, kaj la Universitato de Žilina uzas ĝin por privataj flugoj, ĉar regulaj flugoj ne ekzistas.

Ekde la jaro 2019 funkcias en la urbo sistemo de **kundividitaj bicikloj** *BikeKIA* kun 20 parkejoj kaj 120 bicikloj.

## URBAJ VIDINDAĴOJ

- la **historia kerno**, kiu estas urba memorrezervejo; urba centro estas la kvadratforma Placo de Maria ĉirkaŭita per arkadaj domoj, kun la mezbaroka statuo de la Senmakula Virgulino Maria, la Preĝejo de Invertiĝo de Sankta Paŭlo kun klostro kaj angula malnova urbodomo kun sonorilludo; proksime de la placo staras la Katedralo de la plej Sankta Triunuo kun apuda sonorileja Turo de Burian;
- **kastelo de Budatín** sur la kunfluejo de la riveroj Váh kaj Kysuca;
- romkatolika **ligna preĝejo de Sankta Georgo** en la urba parto *Trnové*, kiu estas unu el malmultaj lignaj preĝejoj ekster la orienta Slovakio;
- **preĝejo de Sankta Stefano, la Reĝo**, en la urba parto *Závodie*, kiu apartenas al la plej malnovaj arkitekturaj memoraĵoj en Žilina;
- **preĝejo de sankta Barbora** (franciskana preĝejo) el la jaroj 1723 – 1730 kun ekstreme valora barokdevena interno;
- **evangelia preĝejo** konstruita en la jaroj 1935 – 1936, kiun projektis nestoro de slovakaj arkitektoj Michal Milan Harminec;
- **ortodoksa sinagogo** kun la ekspozicio de la Muzeo de juda kulturo;
- **reformjudaisma sinagogo** projektita de la grava germana modernisma arkitekto kaj dezajnistoj Peter Behrens.



*Fervoja nodo Žilina – rekonstruita kaj rekonstruita partoj de la kajoj  
(fonto: uzolzilina.sk)*

# PROGRAMO DE LA 76A IFK

| Dato                     | Tempo   | Programero  |
|--------------------------|---|---|
| <b>merkredo</b><br>04 30 | 14:00   | Alveno de la partoprenantoj   |
|                          | 16:30   |  <p style="text-align: right;"><b>Krajská knižnica</b></p> <p>v <b>Žiline</b> (Regiona biblioteko en <i>Žilina [jilina]</i>): solena malfermo de la fotoekspozicio 'La plej belaj turismaj fervojlinioj de Slovakio kaj Pollando</p> |
|                          | 16:00   | <p><b>Hlinkovo námestie</b> (Placo de Hlinka): starigado de la maj-arbo – publika programo ĉe la urboplaco inklude de la prezentado de la infana folklorgrupo <i>Cipovička</i></p>  |
|                          | 17:00   | <p><b>Hlinkovo námestie</b> (Placo de Hlinka): ekspozicio de modeloj de milita ekipaĵo kaj ekzemplo de historiaj bataloj uzante piroteknikaĵojn kaj armeajn modelojn</p>    |
| 20:00                    | <p><b>Prelego</b> pri la urbo <i>Žilina</i></p> |   |
| 21:00                    | <p>Interkona vespero</p>                        |   |
| 21:00                    | <p>Kunveno de la IFEF-estraro kun LKK</p>       |   |

|                          |                  |   |  |
|--------------------------|------------------|---|--|
| <b>ĵaŭdo</b><br>05 01    | 09:30            | Solena malfermo de la kongreso, komuna fotado   |  |
|                          | 11:00            | Faka komisiono  |  |
|                          | 14:00            | Piedekskurso tra Žilina   |  |
|                          | 14:00            | Grimpado sur la lokan montopinton Dubeň [ <i>dubenj</i> ]   |  |
|                          | 20:00            | Prezentaĵo de Georgo HANDZLIK kaj Saša PILIPOVIĆ  |  |
|                          |                  |    |  |
| <b>vendredo</b><br>05 02 | 09:00            | Ĉefa prelego kaj aliaj prelegetoj   |  |
|                          | 14:00            | Kastelo Budatín (duontaga ekskurso)   |  |
|                          | 20:00            | Komuna vespero ĉe gitaro kun Majka MINICHOVÁ  |  |
|                          |                  |   |  |
| <b>sabato</b><br>05 03   | 09:00            | Publika plenkunsido   |  |
|                          | 11:45            | Prezento de la 77-a IFK 2026 (Serbio)   |  |
|                          | 14:00            | Ĉiĉmany [ <i>ĉiĉmani</i> ] (duontaga ekskurso)  |  |
|                          | 20:00            | Solena fermo de la kongreso   |  |
|                          | 20:45            |   | Vingustumado   |
| <b>dimanĉo</b><br>05 04  | 09:00            | Forveturo hejmen aŭ tuttaga ekskurso  |  |
|                          | Tuttaga ekskurso | Trenĉianska Teplá [ <i>trenĉianska tepla</i> ] – vizito de la ekspozicio de la 115-jaraĝa Mallarĝŝpura Elektra Fervojo de Trenĉín (TREŽ), veturado per ties “tramo” al la banloko Trenĉianske Teplice; vizito de la Fervoja Muzeo en Bratislava |  |
| <b>lundo</b><br>05 05    | Post-kongreso    | Bratislava, ĉefurbo de Slovakio – vizito de ĝiaj vidindaĵoj   |  |
| <b>mardo</b><br>05 01    |                  | Forveturo hejmen  |  |

## **KUNSIDORDOJ**

### **Solena inaŭguro de la 76a IFK**

- Himno de FISAIC
- Salutoj fare de oficialaj gastoj
- Filmeto pri 70 jaroj de FISAIC
- Salutoj fare de unuopaj landaj reprezentantoj
- Malfermo de la kongreso fare de IFEF-prezidantino
- Esperanto-himno

### **Tagordo de la ĝenerala asembleo (komitatkunsido)**

- Malfermo, konstato de la mandatoj
  - Ricevitaj mesaĝoj
  - Honorigo al la mortintoj
  - Estraranaj raportoj: sekretario; redaktoro; kasisto
  - Diskuto kasraporto-bilanco 2024/buĝeto 2026, kotizkonfirmo
  - Protokolo IFK Strasburgo
  - Raporto de la ĉefkomitatano
  - Resumo de la jarraportoj 2024 el la landaj asocioj
  - Raportoj de la Faka Komisiono – FK: sekretario de Fake Aplika Sekcio (FAS); sekretario de Terminara Sekcio (TS)
  - Raportoj de la komisiitoj: komitatano „A” de IFEF ĉe UEA, UK Aruŝa; rilatoj al aliaj organizoj: FISAIC; SAT; ILEI; UMEA; ISAE; TAKE; IKEF; fakdelegitoj ĉe UEA
  - Kongresproponoj: elektoj: elekto de la estraro de IFEF; kongresproponoj: neniuj
  - Venontaj kongresoj: konfirmo de la invito al la 77-a IFK en 2026 Beogrado/Mokra Gora (Serbio); elekto de la lando por la 78-a IFK en 2027; Diskuto/propono pri pluaj eblecoj: 2028, 2029
  - Movadaj Aferoj kaj Situacio asocioj en kelkaj landoj (dum la Movada Forumo): analizo pri la situacio kaj la estonto de IFEF; strategia laborplano; raportoj de la laborgrupoj
14. Eventualaĵoj: Libera diskutado

### **Tagordo por la kunveno de FK dum la 76-a IFK en Žilina**

- Bonvenigo
- Fakaj programeroj dum la 76-a IFK
- Raporto pri laboro de la Terminara Sekcio
- Raporto pri laboro de la Fake Aplika Sekcio
- Raportoj pri faka laboro en unuopaj IFEF landaj asocioj
- Trakto de fakaj nocioj (eventuale)
- Faka programo dum la 110-a UK en Brno
- Ceteraĵoj/eventualaĵoj/novaĵoj



## DUONTAGAJ EKSKURSOJ

### KASTELO BUDATÍN RANDE DE LA URBO ŽILINA



Kastelo Budatín situas ĉe la kunfluo de la riveroj Váh kaj Kysuca.

La konstruaĵo kun la plej malnovaj konservitaj partoj el la 14-a jarcento, ĉirkaŭita de historia parko, estas skribe dokumentita jam en la 13-a jarcento.

Ĝi estas utiligata kiel muzeo kun ekspoziciaĵoj arkeologia *Antaŭ la muroj*,

*malantaŭ la muroj*, *Historio de Žilina kaj Epoka interioro*. La ekspozicio en la turo de la kastelo rilatas al ĝia *historio*.

Konstanta ekspozicio pri la historio de dratumarto, tiu unika slovakaj fenomeno, troviĝas en la ejoj de la *Dratumista Pavilono*. Per historiaj artefaktoj faritaj el drato kaj lado, perioddokumentoj, fotoj kaj artaĵoj, ĝi prezentas la historion kaj materialajn sukcesojn de tiu ĉi origina metio de ĝiaj emigraj komencoj ĝis fabrikproduktadoj, proksimigas la komercajn sukcesojn de slovakaj dratumistoj eksterlande kaj la metian lertecon, kiu famigis ilin en la tuta mondo. En decembro 2019, la elemento *dratumado – metio kaj arto* estis enskribita en la Reprezentanta Listo de Unesko de la Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro.

La historia angla parko kun la areo de 4,7 ha, verŝajne fondita en la mezo de la 19-a jarcento, ofertas la eblecon de agrabla promenado. Parkpejzaĝoj estis plejparte kunmetitaj tiel, ke ili ligiĝu kun la ĉirkaŭa pejzaĝo. Enlandaj, hejmaj arboj dominis. Oni taksas, ke la plej maljunaj tilioj kun la trunka ĉirkaŭmezuro de 435 ĝis 600 cm aĝas ĝis 250 jarojn. Gigante aspektas ankaŭ kelkaj sikomoraj aceroj kun trunka ĉirkaŭmezuro de 310 ĝis 560 cm kaj laŭtaksa aĝo ĝis 230 jaroj. La transpendanta formo de la eŭropa fago kun trunka ĉirkaŭmezuro de 320 cm verŝajne estis plantita fine de la 19-a jarcento. Fremdajn arbojn reprezentas acerfoliaj platanoj kun trunka ĉirkaŭmezuro de 390 ĝis 570 cm. La plej maljunaj arboj en la parko estas ankaŭ la plej altaj specimenoj kun alteco de ĝis 30 m. El varia speciokonsisto de birdkomunumoj ĝis 28 nestantaj birdospecioj estis trovitaj ĉi tie. Ilia ĉefa parto estas la t.n. kavaj nestumantoj (ekzemple siria bruntpego, verda pego, blankakola muŝkaptulo, kaj paruoj). Grava kondiĉo por ilia konstanta ekzisto kaj reproduktado estas kavaĵoj koncentritaj ĉefe en trunkoj kaj pli dikaj branĉoj de tilioj.

## GRIMPADO AL LA ĈEURBA MONTO DUBEŇ

Monteto Dubeň, altiĝanta de 613 m super marnivelo, estas unu el la ekskursejoj ĉirkaŭ la urbo Žilina. Markitaj migraj vojoj kondukas al ĝi de Budatín kaj Zástranie. Ĝi apartenas al la montaro Kysucká vrchovina (Altebenaĵo de Kisuće-regiono). Ĝi havas klare longforman formon kaj etendiĝas de la distrikto Žilina de Budatín ĝis Teplička nad Váhom [tepliĉka]. Ĝi estas dense arbarkovrita, do nur escepte oni povas trovi malgrandan maldensejon, el kiu oni povas observi la urbon Žilina kaj la montetojn de Lúčanská Malá Fatra [luĉanska]. Antaŭ kelkaj jaroj konstruita observejo disponigas belan vidon de la urbo kaj la ĉirkaŭa naturo el alteco de 27,4 metroj, de ĝia plej alta, deka etaĝo de ĉi tiu arkitektura gemo.



*La elrigarduro sur la montopinto Dubeň rande de Žilina*  
<https://cestujzamenej.sk/2019/06/05/vyhliadka-na-dubni-v-ziline-super-vylet-na-vikend/>

## ČIČMANY

La karakteriza vilaĝo Čičmany estas konata pro sia unika arkitekturo – pentritaj trunkdomoj. Ĝi enhavas 115 objektojn, el kiuj 36 estas naciaj kulturaj memoraĵoj. Por savi ilin, la malsupra parto de la civito estis deklarita popularkitektura monumentrezervejo. Tiuj objektoj kun geometria ornama dekoracio de la eksteraj muroj estas valoraj pruvoj de la teknika sofistikeco, kapablo kaj estetika sento de la enloĝantoj. En la pasinteco, la ŝablonoj estis tute simplaj, pentritaj per kalko aŭ argila koto, precipe sur la anguloj de domoj, kie la ligno estis kunigita. Ornamaĵoj, kiel ili estas sur domoj hodiaŭ, aperis nur post la ruiniga fajro en 1921. Dommastrinoj kutime ornamas siajn domojn laŭ modeloj broditaj sur lokaj kostumoj. Ili repentras la ornamaĵojn kiam ajn ili komencas paliĝi. Plejparte ili ne plu uzas kalkon, sed pli daŭrajn lateksajn farbojn.

La Považské-Muzeo posedas en Čičmany du objektojn de popularkitekturo, kie al vizitantoj estas prezentitaj iama loĝmaniero, laborokupiĝo, popolvestaĵo, kaj popolararto. La duetaĝa galerio "Domo de Raden" enhavas la ekspoziciojn "El la vivo kaj laboro de la lokuloj" kaj "El familiaj moroj". La ekspozicio "Popolloĝejo" en la trunkdomo n-ro 42 prezentas la tielnomitan grandfamilian loĝejon el la 1920-aj jaroj. La individuaj domoj estis loĝataj kaj administrataj fare de gemastrumantoj, iliaj geedzitaĵoj kaj ties edzinoj kun siaj infanoj. La posedaĵo de la familio estis dividita. Grandan parton de la ĉambro, kiu estis la sola hejtita spaco en la domo, okupis argila forno kun du-tri fajrujoj. La interno de la ĉambro estis simpla: benkoj ĉirkaŭ la muroj, bretoj por vazaro, tablo kaj lito. Junaj familioj dormis en ĉambroj en la supra parto de la duetaĝa domo. Tiuj estis mallumaj, nehejtigitaj, kun unu lito kaj pentrita kesto, en kiu la novedzino konservis siajn personajn posedaĵojn.

En la supra parto de la vilaĝo konserviĝis grandbieno en la barok-klasikisma stilo el la fino de la 18-a jarcento, kiu servis al la bezonoj de la administranto, la guberniaj oficistoj kaj la grandsinjoro. La grandbieno inkludis garbejon, ŝafejon, stalon kaj tavernon. Cetere, la loĝantoj de Čičmany iam okupiĝis ĉefe pri agrikulturo, bredado de ŝafoj, produktado de pantofloj kaj produktado kaj vendo de mola saligita ŝaffromaĝo „bryndza“. Hodiaŭ ĉi tie estas hotelo, restoracio kaj gastejo.

La vilaĝo ankaŭ estas interesa pro sia loka popolkostumo, farita el blanka tolaĵo. Valoro kaj populareco de tiu vestaĵo ŝuldas al brodaĵo, kiu elstaras pro sia teknika perfekteco, riĉego de motivoj, kaj ornama kaj bunta komponado. La karaktero de la ornama plibeligaĵo kaj la ruĝa lana teksita zono, kiu estas parto de la virina vestaĵo, sugestas la balkanan originon de la civito.



*Tipa pentrita domo en Čičmany (Pixabay)*

## TUTTAGA EKSKURSO



## TREŽ, ELEKTRA FERVOJO TRENČIANSKA

La celo de konstruado de la loka elektra fervojo inter la civitoj Trenčianska Teplá – Trenčianske Teplice estis krei transportrimedon, kiu certigus la transporton de pasaĝeroj, aparte vizitantojn de la kuracloko, inter la stacidomo en Trenčianska Teplá kaj kuracloko Trenčianske Teplice.

La decida paŝo por la realigo de tiu ĉi elektra fervojo estis en 1907 la propono de inĝeniero Edmund BLEIER el Trenčín por konstrui elektran fervojon kun ŝpuro de 760 mm. La ĵurnalo *Trenčianske noviny* raportis, ke regula fervoja ekspluato komenciĝis la 27-an de junio 1909 je la naŭa horo.

La linio turniĝis en kurbo de la stacio Trenčianska Teplá, alproksimiĝis al la rivereto *Teplička* kaj laŭ ĝiaj bordoj trapasis la vilaĝon ĝis Trenčianske Teplice. Malantaŭ la vilaĝo, ĝi malproksimiĝis de la rivereto kaj pasis tra la kampoj paralele al la tiama nepavimita vojo. Post la dutraka deflankiĝejo *Kaňová [kanjova]* por kruciĝo de trajnoj ĉe la km 3,090 la linio strikte sekvis la ŝtatan vojjon, kaj en Trenčianske Teplice kondukis laŭlonge de la stratoj al la kuracloko. Ĝus malantaŭ la ponto super la rivero *Teplička* estis konstruita memstara stacio Trenčianske Teplice-stacio, kun deflankiĝo al la magazeno kaj transportoficeja konstruaĵo. De tie la linio daŭris laŭ la riverbordo preter la nun jam malfunkcianta hotelo *Garni*, post kiu sekvis dutraka deflankiĝejo, servanta por turnado de trajnoj. Post ĝi la trako daŭris malantŭ la finkonstruita hotelo *Grand* al sakstrato ĉe la kajo kun atendoĉambro por pasaĝeroj en la haltejo Trenčianske Teplice – *kúpele* surloke de la hodiaŭa alirvojo.

En la kuracurbaj stratoj la fervojkonstruistoj aranĝis itineron de la fervojlinio en kurboj kun radiusoj de 40 ĝis 50 metroj. La plej alta gradiento sur la linio estis 15 ‰. Sur la linio, kiu en sia originala formo havis entutan konstruan longon de 5,936 km, estis konstruitaj unu ŝtalbetona ponto 14 metrojn longa, 16 tralasejoj, unu stacidomo, du haltejoj, unu gardposteno kaj 44 traknivelaj trapasejoj.

Ekde la komenco la interurba elektra fervojo Trenčianska Teplá – Trenčianske Teplice pli rememorigis pri tramfunkciadoj konataj de kelkaj el niaj urboj. La linio estis origine elektrigita kun DC-sistemo kun tensio de 750 V kun simpla nekompensita tiradlinio, pliiĝis sur lignaj fostoj, kiuj pluvivis ĝis la nuntempo.

La unuaj vagonoj sur la linio estis tri elektraj pasaĝervagonoj kun unua- kaj triaklasaj kupeoj, du rulvagonoj kun poŝta kupeo kaj triaklasa pasaĝera kupeo, unu fermita kaj unu malfermita altmuraj ŝarĝvagonoj liverita de la firmao *Magyar Waggon és Gépkjár r.t. Győr*. En 1911 la budapeŝta vagon-fabrikisto GANZ

produktis elektran ŝarĝvagonon por la bezonoj de la fervojo, taŭgan por transporti pecvarojn, pakaĵojn kaj pasaĝerojn, kaj unu malfermitan vagonon taŭgan por uzado en bona vetero, kiun liveris la *Budapeŝta Égyesülz Villámossági és Gépgyár r.t.*

La suma longo de la linio nuntempe estas 5 427 km. En 1971, estis aranĝita parta reconstruo de la linio. La fervojo estis taksita kiel malefika kaj *Československé dráhy ČSD* ([*československe drahy*] Ĉeĥoslovakaj Fervojoj) volis nuligi ĝin. En la 1980-aj jaroj, la motoraŭtoj estis rekonstruitaj, la tiradaŭtoj estis konvertitaj en kontrolaŭtojn, kaj konsidero komencis esti donata al konvertado de la linio al ŝpuro de 1 000 aŭ 1 435 mm. La lasta renovigado de la linio okazis en 1966.

Pro la nekontentiga stato de la trako, fervoja trafiko estis interrompita de la 7-a de marto 2000. Necesis kompleta reconstruo de la fervoja superkonstruaĵo por certigi sekuran funkciadon. La 20-an de septembro 2000, rekomenciĝis la reconstruo de la elektra fervojo kaj la vojaĝdaŭro estis reduktita de la originaj 25 al la nunaj 18 minutoj.

La 10-an de decembro 2011, post 102 jaroj, ĉesis la regula pasaĝertransporto regata de *Železničná spoločnosť Slovensko, a.s.* ([*železnična spoločnosť*] Fervoja Kompanio Slovakio) estis haltigita. Ekde la 1-a de januaro de la sekva jaro la fervojon grupo de volontuloj transprenis. En februaro 2013, la municipo de Trenčianska Teplá fondis la neprofitcelan organizaĵon *Trenčianska elektrická železnica* ([*trenčianska elektricka železnica*] Elektra Fervojo Trenčianska), kiu disponigas malregulan – turisman transporton sur la linio.

Somere de 2015, kun subteno de la Aŭtonoma Regiono Trenčín estis lanĉitaj someraj semajnfinaj veturadoj lige al la alveno kaj foriro de trajnoj al Trenčianska Teplá.



*La motorunuoj de TREŽ en Trenčianska Teplá*

(Petr Štefek – *Vlastní dílo*, CC BY-SA 3.0 cz, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=157220581>)

## MUZEU DE TRANSPORTO EN BRATISLAVA



La Muzeo de Transporto en Bratislava estas filio de la Slovaka Teknika Muzeo sidejanta en Košice [*košice*]. La muzeo okupiĝas pri dokumentado de la historio de ŝosea, fervoja kaj akva transportoj en Slovakio kaj prezentado de ĝi al publiko en formo de konstanta kaj porokazaj temaj ekspozicioj. La muzeo troviĝas en la areo de la unua vaporfervoja stacio de la iama Hungara Centra Fervojo el la 19-a jarcento, en la areo de ĝia trakaro kaj du apudaj tenejoj. La muzea komplekso estas nacia kultura memoraĵo.

En 1973 estis en Bratislava fondita la Rondo de Fervojamikoj. En 1972 estis fondita Veterana Klubo Bratislava, la unua slovak klubo de kolektantoj de historiaj aŭtoj kaj motorcikloj. En 1979 ili akiris la unuan historian vaporlokomotivon, kiu ekde 1981 fariĝis parto de la slovak kolekto de trafikkapablaj historiaj fervojveturiloj. Ekde 1983, la Muzea kaj Dokumentada Centro, funkcia en kadre de la Fervojoj de Slovaka Respubliko (ŽSR – Železnice [*jeleznice*] Slovenskej Republiky), administras tiun kolekton kune kun ampleksa dokumentaro de la historio de slovakaj fervojoj.

En 1998 ŽSR kaj la Veterana Klubo Bratislava interkonsentis pri komuna establado de Muzeo de Transporto en la jaro de la 150-a datreveno de fervojoj en Slovakio. La unua slovak transportmuzeo estis ceremonie malfermita al publiko la 24-an de junio 1999.

Sur la trakaro la muzeo ekspozicias pli malnovajn fervojveturilojn. La unua tenejo, per ekspoziciaĵoj el la kampo de sekureco, signalado kaj komunikadteknologio, artefaktoj el la kampo de konstruado kaj prizorgado de traka superkonstruaĵo, siatempaj uniformoj de fervojdungitoj, modeloj de fervojaj veturiloj, ktp., gastigas ekspozicion pri la evoluo de fervojoj en Slovakio.

Vizitantoj de la muzeo tie trovas diversspecajn transportilojn de bestotirataj veturiloj, inkluzive de historiaj ĉaroj, ĉaroj kaj sledoj, tra kolekto de bicikloj, motorcikloj kaj tricikloj ĝis aŭtomobiloj el la intermilita periodo, plejparte de la plej gravaj ĉeĥoslovakaj fabrikistoj (*Praga, Škoda, Tatra, Aero*).

En la dua tenejo estas la historia fajroestinga ekipaĵo el la periodo de post la Dua Mondmilito. Vizitantoj konatiĝos tie kun la evoluo de la plej grava marko de personaŭtoj en postmilita Ĉeĥoslovakio. Oni trovas ĉi tie unikajn funkciajn specimenojn kaj prototipojn de pasaĝeraj kaj komercaj veturiloj, fabrikitaj ĉe la *Bratislavské automobilové závody* (Bratislava Aŭtomobila Entrepreno). Interesa estas diorama de ŝarĝaŭtomobilo, kiu estis uzata por provizi la merkaton, aŭ diorama de epoka aŭtoriparejo kun multa nun jam historia instrumentaro por esploro de la teknika stato de veturiloj.

La tenejaj konstruaĵoj estas unikaj kaj ilustras la etoson de nia teknika historio, ĉar ili estas en la industria, tiel nomata fervoja stilo, tipa per sia brika konstruo, kun ŝtonaj elementoj kaj kolonoj subtenantaj la tegmenton.

Al la muzeaj ekspozicioj apartenas: *Evoluo de fervoja sekurectekniko*; *La ora epoko de transportado sur vojoj kaj reloj*; *Evoluo de fervoja tekniko en Slovakio*; *Mejloŝtonoj de slovaka motorismo en la dua duono de la 20-a jarcento*.





### BRATISLAVA, LA ĈEFURBO DE SLOVAKIO

*Bonvenigas vin la statuo de Schöne Náci,  
iama tipa figuro de la urbo (Pixabay)*

**Bratislava** (en mezepoko greke *Istropolis*, latine *Posonium*, ĝis la jaro 1919 slovake *Prešporok/Prešporek*; germane *Preßburg*, hungare *Pozsony [poĵonj]*, pole *Bratysława*, ruse *Братислава*, parollingve ankaŭ *Blava*) etendiĝas sur ambaŭ bordoj de la rivero Danubo (*Dunaj*). Antaŭ la Dua Mondmilito en la urbo estis uzataj tri lingvoj: germana, hungara kaj slovakaj. Bratislava estas la unusola ĉefurbo en la mondo, kiu limas kun du landoj – Hungario kaj Aŭstrio. Nuntempe ĝi estas titolata Malgranda granda urbo.

Ĝi estas **ĉefurbo** de Slovakio kaj kun pli ol 425 mil **loĝantoj** ankaŭ ĝia plej loĝata urbo. Per sia **areo** ĝi post urbo *Vysoké Tatry* (Altaj Tatroj) estas la dua plej granda urbo de Slovakio. En ĝi **sidejas** la registaro, la parlamento, diversaj ministerioj kaj oficejoj. Agas ĉi tie kelkaj universitatoj, teatroj, muzeoj kaj aliaj kulturaj institucioj.

Unu el la simboloj kaj orientiga punkto de Bratislava estas svelta **Televidturo *Kamzík*** (Ĉamo) kun la restoracio *Veža* ([*veĵa*] Turo) en alteco de proksimume 70 m super la grundo. Ĝiaj sidlokoj estas metitaj sur rulplatformo, kiu malrapide disponigas panoraman vidon al la urbo. Ĝi situas sur la monteto *Kamzík*, 433 m super la marnivelo, kaj estas la plej alta konstruaĵo ne nur de la urbo, sed eĉ en tuta Slovakio. Ĝi estas 194 m alta kaj ĝia pinto estas 635 m super la marnivelo. Ĝi estis finkonstruita en 1975. La turo havas la formon de du kvaredraj tranĉitaj piramidoj ligitaj per siaj bazoj en proksimume du trionoj de ĝia alteco. De unu pinto leviĝas cirkla dissendila anteno, dum la alia pinto estas turnita direkte al la grundo. Meze de la turo estas kvadrata kerno. Lokanoj nomas ĝin Radia Diamanto.

Alia monumento, etendiĝanta super la urbo, estas la militmemorejo *Slavín*, 39,5 m alta marmora angulhava obelisko kun ceremonia ĉambro malsupre, kie estas skribitaj nomoj de unuopaj slovakaj urboj kaj datoj de ilia liberigo fare de sovetiaj soldatoj. Apudas tomboj de Ruĝarmeanoj, kaj gvidas al ĝi ŝtuparego.

La t.n. *Manderlák*, vendeja kaj loĝeja domo, nomita laŭ sia posedanto, estis inspirita per ĉikaga buĉejo, kaj konstruita ankoraŭ antaŭ la Dua Mondmilito. Siatempe ĝi estis la unua altec-konstruaĵo en Slovakio, kaj en la intermilita periodo la plej alta konstruaĵo de Ĉeĥoslovakio. La 'ĉielskrapulo', staranta sur kvar solidaj kolonoj, havis por sia tempo nekredablajn dek unu etaĝojn.



Nacia kultura monumento de Slovakio, la ŝtala konstruaĵo de **Slovaka Radio** el 1983 havas formon de inversa piramido kun totala alteco 80 metrojn ĝis la pinto de la anteno. Ĝi havas riĉajn internajn spacojn, bonegan koncertejon kaj bone ekipitajn registradstudiojn. En ĝi troviĝas ankaŭ unu el la plej grandaj orgenoj en Slovakio.



*Kamzík (Pixabay)*



*Slavín (Pixabay)*



*Slovaka Radio (Pixabay)*

Dominaĵo de Bratislava estas kvarangula **burgo**, ŝerce nomata 'inversigita tablo', kiu dum jarcentoj servis kiel reĝa kaj komunuma sidejo; hodiaŭ en ĝi sidejas Nacia Muzeo. Apud ĝi troviĝas konstruaĵo de la **Nacia Asembleo** de Slovakio. Proksime staras la **Katedralo de S-ta Marteno**, eksa kronadtemplo de reĝoj de Hungara Reĝlando. En ĝi estis kronitaj Habsburgoj, kiuj akceptis ankaŭ la hungaran kronon, nome 11 reĝoj kaj 8 reĝinoj. La plej bela preĝejo estas la **Modrý kostolík** (Blua preĝejo), unu el la plej impona konstruaĵo de la hungara secesia stilo, al kiu donas bluan Ceramiko de Vilmos ZSOLNAY.

Bratislava estas sidejo de **Slovaka Nacia Muzeo**, historion de la urbo celas **Urba Muzeo**, apud ĉefa fervojstacio estas **Muzeo de Transporto**. Interesa estas **Muzeo de Horloĝoj** en Domo ĉe Bona Paŝtisto vid-al-vide de la Katedralo de Sankta Marteno, **Farmaceutika Muzeo** apud Michalská-Turo. Por juda komunumo estas eksterordinare grava **Muzeo de Juda Kulturo** kaj **Maŭzoleo de Chatam Sófer**. Sur danuba digo proksime de la ŝtatlimoj kun Aŭstrio kaj Hungario troviĝas **Muzeo kaj Galerio de Moderna Arto Danubiana**, kies fondintoj estas la nederlanda entreprenisto, kolektanto kaj artmecenato Gerard MEULENSTEEN kaj la slovako Vincent POLAKOVIČ.

El kulturaj okazaĵoj estas konataj festivalo de serioza muziko **Bratislavaj Muziksolenoj** en *Reduta*, kiujn ĉiujare aranĝas **Slovaka Filharmonio**, internacia ĵaza festivalo **Bratislavaj Ĵazaj Tagoj** kaj ankaŭ **Bratislava Filmfestivalo**. Multjaran historion havas **Bibiana**, internacia domo de arto por infanoj, ekestinta en 1987, subtenanta la evoluon de ilustrita porinfana librokreado kaj pliboniganta

la kvaliton de porinfana literaturo en- kaj eksterlande. En lastaj jaroj tradicias **Bratislavaj Kronadsolenoj**, kiuj klopodas fidele similigi gravajn historiajn momentojn, kaj tiel levi la signifon de Bratislava kiel kronadurbo.

La plej konata placo en Bratislava estas la **Ĉefa Placo** en la urbocentro. Sur ĝi troviĝas fontano kun statuoj de reĝo Maksimiliano la Dua kaj Malnova Urbodomo, en kiu hodiaŭ troviĝas Urba Muzeo. Tra ties interna kortego oni povas veni en pluan placon, sur kiu situas **Primasa palaco**, iama sidejo de esztergoma ĉefepiskopo. En la jaro 1805 estis en **Spegula Ĉambrego** de la palaco subskribita la t.n. bratislava paco. Hodiaŭ la ĉambrego servas kiel reprezentiga ĉambro, en kiu eblas admiri kolekton de anglaj gobelinoj. Sur la proksima **Placo de Hviezdoslav** troviĝas **Slovaka Nacia Teatro**, konstruita laŭ modelo de pariza teatro. En ĝi nuntempe okazas operaj kaj baletaj spektakloj. Sub ties agadon apartenas ankaŭ Teatro de Pavol ORSZÁGH-HVIEZDOSLAV kaj Malgranda Scenejo – Dramejo. Ekde aprilo de 2007 ĝi havas sidejon en nova konstruaĵo apud Danubo proksime de nova moderna urba kvartalo *Eurovea*.

En la urbo estas kelkaj universitatoj kaj altlernejoj. Inter ili elstaras **Academia Istropolitana**, ekestinta en la jaro 1465 el iniciato de Matiaso la Unua. Ĝi estis la tria akademio, fondita en la Hungara Reĝlando, kaj la unua sur la nuna teritorio de Slovakio. La plej granda slovakia universitato, **Universitato Komenio en Bratislava** (slovaĉe Univerzita Komenského), nomita honore al Johano Amoso KOMENIO, ĉeĥa instruisto kaj filozofo el la 17a-jarcento, estis fondita en 1919, post ekesto de Ĉeĥoslovakio.

En Bratislava troviĝas kvin pontoj, kiuj kunigas la maldekstran bordon de Danubo, kie troviĝas la Malnova Urbo, kun la dekstra bordo, kie troviĝas la plej loĝigita urba kvartalo *Petržalka* [*petrjalka*]. La dominaĵo de Bratislava kaj unu el la plej grandaj atrakcioj estas precipe **Nova Ponto**, super kiu en alteco de 85 metroj troviĝas restoracio nomita *UFO* (*Nifo*) kun elrigardteraso. Pro siaj parametroj Nova Ponto estas la sepa plej granda pendanta pondo en la mondo. La plej nova ponto en Bratislava estas **Ponto Apollo**, same monda unikaĵo, ĉar ĝi estas la plej granda ponto en la mondo, kiu estis konstruita sur la bordo kaj sekve transturnita al sia firma loko sur la alia bordo de Danubo helpe de sistemo de kunigitaj ŝipoj, pro kio ĝi ricevis mondan prestiĝan aprezon *OPAL Awards* 2006.



*napoleona soldato*



*Gardistejo*



*Ĉumil [ĉumil] (Gapanto)*

Bratislava estas urbo eksterordinare riĉa je parkoj, inter ili **Parko de Janko KRÁĽ** [*kralj*], fondita en la jaroj 1774 ĝis 1776, kiu estis la unua publike alirebla parko en Mez-Eŭropo.

Bratislava troviĝas sur grava danuba direkto inter Vieno kaj Budapeŝto. La plej grava destinloko de persona **ŝipa transporto** el Bratislava estas Vieno kaj la veturo daŭras ne pli longe ol 90 minutoj. Krom tio inter la plej popularajn apartenas linio el Bratislava al **Devín**, kies burgo-ruinaĵo, kiu troviĝas sur 80 m alta montokrutaĵo, vid-al-vide de la aŭstra urbo *Hainburg an der Donau*.

El la plej granda slovakia **flughaveno**, portanta nomon de Milan Rastislav ŠTEFÁNIK [*ŝtefanik*], slovakia astronomo, aviadisto, politikisto, diplomato, generalo de la franca armeo, oni flugas en dekojn de destinlokoj. Multaj vojaĝantoj utiligas ankaŭ la proksiman internacian flughavenon *Schwechat* [*ŝveĥat*] apud Vieno.

En Bratislava troviĝas kelkaj **fervojjaj stacidomoj**. Krom la enlanda transporto eblas uzi la trajnojn ankaŭ por vojaĝo en Ĉeĥan Respublikon (al Prago oni povas plej rapide veturi per Elektra Trajnkompleto 680, *Pendolino*, unusola trajno kun aktiva klinigo de veturilsranko de la firmao *Fiat Ferroviaria*), Hungarion, Aŭstrion, eventuale rektaj vagonoj veturas ĝis Pollando, Belorusio kaj Rusio. La dua plej grava stacio estas stacio Bratislava-Petržalka, uzata precipe por trajnoj ĝis Vieno.

Al **ĝemelurboj** de Bratislava apartenas aŭstra Vieno, pola Krakovo, slovenia *Ljubljana*, germana *Ulm*, itala *Perugia* (historie la plej malnova partnera urbo, de la jaro 1962) ĉeĥa Prago, rusa *Saratov*, Ukraina Kievo, finlanda *Turku*, usona *Cleveland* kaj nederlanda Roterdamo.



*Burgo de Bratislava kaj restoracio UFO (Pixabay)*

# UTILAJ INFORMOJ

## LA MONUNUO – PAGADO

En Slovakio oni pagas per **eŭroj** (EUR). Preskaŭ ĉie eblas pagi per bankkartoj. Tamen foje la alteco de la pago estas limigita super 5 aŭ 10 eŭrojn. La bankomatoj oftas. La monŝanĝo en banko ne rekomendindas, ĉar ĝi estas sufiĉe kosta.

## KONGRESEJO

Hotelo **Galileo**, Hlinská 25, Žilina

Bv. ne korespondi rekte kun la hotelo! Por retdemandi pri io ajn bv. skribi al la retadreso **ifk@ikso.net**. Kaze de nepra bezono bv. telefoni al **Petro BALÁŽ**, telefonnumero +421 902 203 369.



## FERVOJA TRAFIKO (ŽELEZNICE SLOVENSKEJ REPUBLIKY - ŽSR)

Pro la rekonstruado de la kajoj estas iom komplike moviĝi en la fervoja stacio de Žilina. Estas du eblecoj: veni al la kajo U, aŭ al la kajoj 3 kaj 4.

La **U-kajo** estas la plej malproksima. Sekvu la homamason kaj la vojdirektilojn surpavime. Vi devos paŝi laŭ la kajo, poste trairi la straton, preni la lifton (aŭ paŝi laŭŝtupare) malsupren, trairi la subkajan tunelon, kiu pro la rekonstrulaboroj estas sufiĉe mallarĝa. Vidante la kioskojn antaŭ si, plumarŝu antaŭen, kaj por eliri al la nivelo de la strato uzu la lifton aŭ la ŝtuparojn ambaŭflanke de la lifto. Ne eliru erare al la alia strato per la vid-al-vida ŝtuparo.

El la **kajoj 3 kaj 4** vi ŝparos duonon de marŝado kompare kun la U-kajo, sed sur ili ankoraŭ ne estas konstruitaj liftoj, do vi devos uzi la ŝtuparojn, eĉ ne moviĝantaj. En la subkaja tunelo agu kiel la veturantoj el la U-kajo.

Elirinte al la strato, havante malantaŭdorse la stacidomon, dekstriĝu kaj tuj vi vidos la **haltejon de numero 4**.

## URBA TRAFIKO (MESTSKÁ HROMADNÁ DOPRAVA – MHD)



Veturante al la hotelo Galileo prenu la trolebuson **n-ro 4** al la sesa haltejo **Polná**, kiu pliproksimas al nia kongresejo. Poste trairu la straton laŭ la trairejo antaŭ la trolebuso kaj sur la dua flanko de la ŝoseo revenu kelkajn metrojn – la hotelo estos dekstraflanke.

Veturante el la hotelo al la fervoja stacidomo restu sur la flanko de ĝi. Vi devos uzi la trolebuson **n-ro 14** el la haltejo **Polná**, maldekstradirekte de la hotelo, aŭ el la haltejo **Hlinská** dekstradirekte de la hotelo, kiu fervojstacidirekten ŝajnas esti pli proksima. La stacidoma haltejo estas kvina, respektive kvara.

**Rabatita veturo:** infano ĝis la 16a jaraĝo; studento ĝis la 26a jaraĝo; persono super la 62a jaraĝo; handikapulo; rabat-rajtigon necesos **pruvi** per pasporto, identiga karto aŭ ISIC-karto.

**Senpaga veturado:** infano ĝis la 6a jaraĝo; unu plenkreskulo kun minimume 1 infano ĝis la 4a jaraĝo; unu plenkreskulo kun infanĉaro kun infano; plenkreskulo super 70 jaroj; akompananto de handikapulo pli aĝa ol 10 jaroj; ĉaro de handikapulo / gvidhundo de nevidanto

**Bagagbileto:** bagaĝo pli granda ol 30x40x60 cm; cilindroforma bagaĝo pli longa ol 150 cm kaj kun pli gdranda diametro ol 20 cm; infanĉaro sen infano; hundo aŭ alia besto.

**Paperan veturbileton necesas senvalidigi** post la eniro en la unuan veturilon en la **verda** signilo; post veturilsanĝo la veturbileto ne plu senvalidiĝas.

**Elektronikan veturbileton** oni pagu enirinte la unuan veturilon per la banka pagkarto helpe de **flava** signilo.

| Veturbileto   | Baza    |                  | Rabatita |                  |
|---|---------|------------------|----------|------------------|
|   | papera  | bankkarte pagita | Papera   | bankkarte pagita |
| 12-minuta ŝanĝbileto                                      | 0,90 €  | 0,80 €           | 0,60 €   | 0,55 €           |
| 60-minuta ŝanĝbileto                                      | 1,00 €  | 0,90 €           | 0,70 €   | 0,65 €           |
| 60-minuta bileto aĉetebla ĉe ŝoforo                       | 2,00 €  |                  |          |                  |
| 24-hora (tutreta)   | 8,00 €  |                  | 5,00 €   | 4,00 €           |
| 72-hora (tutreta)   | 22,00 € |                  | 14,00 €  |                  |
| 60-minuta bileto besto/bagaĝo                             | 0,40 €  | 0,40 €           |          |                  |
| 60-minuta bileto<br>persono+besto/bagaĝo                  | 1,20 €  | 0,95 €           |          |                  |
| 60-minuta SMS-bileto<br>(malplena mesaĝo al la n-ro 1155) | 1,10 €  |                  |          |                  |

## MALGRANDA VORTARETO KUN KELKAJ UTILAJ ESPRIMOJ

|                                   |                           |
|-----------------------------------|---------------------------|
| Bonvenon!                         | Vitaj/te!                 |
| Bonan matenon!                    | Dobré ráno!               |
| Bonan tagon!                      | Dobry den!                |
| Ĝis revido!                       | Dovidenia!                |
| Bonan vesperon!                   | Dobry večer!              |
| mi petas                          | prosím                    |
| Dankon!                           | Ďakujem!                  |
| Bonvolu diri al mi, mi petas, ... | Povedz/te mi, prosím, ... |

\* \* \*

|                 |                    |
|-----------------|--------------------|
| fervojestacio   | železničná stanica |
| fervojo         | železnica          |
| trajno          | vlak               |
| rapidtrajno     | rýchlik            |
| persona trajno  | osobný vlak        |
| kajo            | nástupište         |
| enirejo         | vchod              |
| elirejo         | východ             |
| kaso            | pokladňa           |
| bileto          | lístok             |
| veturbileto     | cestovný lístok    |
| unua /dua klaso | prvá/druhá trieda  |
| sidlokbileto    | miesténka          |
| litbileto       | lôžkový lístok     |
| valizo          | batožina           |
| informejo       | informácie         |

|          |                |
|----------|----------------|
| necesejo | záchod (WC)    |
| fumado   | malpermesita   |
|          | zákaz fajčenia |

\* \* \*

|                |                            |
|----------------|----------------------------|
| taksio         | taxi                       |
| bushaltejo     | autobusová zastávka        |
| trolebus       | haltejozastávka trolejbusu |
| trolebusnumero | trolejbus číslo            |

\* \* \*

|                      |            |
|----------------------|------------|
| strato               | ulica      |
| zono por piedirantoj | pešia zóna |
| hotelo               | hotel      |

\* \* \*

|                |            |
|----------------|------------|
| eŭro (EUR)     | euro (EUR) |
| banko          | banka      |
| banka aŭtomato | bankomat   |
| monŝanĝejo     | zmenáreň   |

\* \* \*

|               |            |
|---------------|------------|
| vendejo       | obchod     |
| nutraĵvendejo | potraviny  |
| pano          | chlieb     |
| kornobulko    | rožok      |
| fromaĝo       | sy         |
| salamo        | saláma     |
| bildkarto     | pohľadnica |

\* \* \*

|                  |       |                 |
|------------------|-------|-----------------|
|                  | manĝi | jest'           |
| Bonan apetiton!  |       | Dobru chut'!    |
| restoracio       |       | reštaurácia     |
| supo             |       | polievka        |
| ĉefmanĝo         |       | hlavné jedlo    |
| trinki           |       | piť             |
| vinkelo          |       | vináreň         |
| vino             |       | vino            |
| bierejo          |       | piváreň         |
| biero            |       | pivo            |
| bufedo           |       | bufet           |
| kafejo           |       | kaviareň        |
| dolĉaĝejo        |       | cukráreň        |
| kafo             |       | káva            |
| sukero           |       | cukor           |
| lakto            |       | mlieko          |
| teo              |       | čaj             |
| mineralakvo      |       | minerálna voda  |
| kun/sen gaso     |       | sýtená/nesýtená |
| iomete karbonata |       | minerálna voda  |
| minerala akvo    |       | jemne sýtená    |
| kuko, torto      |       | zákusok, torta  |
| Kiom tio kostas? |       | Koľko to stojí? |
| Kiom mi pagas?   |       | Koľko platím?   |

## LISTO DE LA PARTOPRENANTOJ

BRACKE Clara (Belgio)  
CUFFEZ Marc (Belgio)  
ABELOVSKÁ Anna (Ĉeĥio)  
BAUEROVÁ Ilona (Ĉeĥio)  
DRAHOTOVÁ Jindřiška (Ĉeĥio)  
DVOŘÁK Viktor (Ĉeĥio)  
DVOŘÁKOVÁ Libuše (Ĉeĥio)  
GYBASOVÁ Anna (Ĉeĥio)  
HAKL Ladislav (Ĉeĥio)  
CHRDLE Petr (Ĉeĥio)  
KLUMPAR Alois (Ĉeĥio)  
KLUMPAROVÁ Marie (Ĉeĥio)  
KOVÁŘ Jan (Ĉeĥio)  
KOVÁŘ Ladislav (Ĉeĥio)  
KOVÁŘOVÁ Jaroslava (Ĉeĥio)  
KUKLA Jan (Ĉeĥio)  
KUKLOVÁ Marta (Ĉeĥio)  
LÁNI Ladislav (Ĉeĥio)  
MATUŠKA Jaroslav (Ĉeĥio)  
PAZOURKOVÁ Eva (Ĉeĥio)  
POKORNÝ Jaroslav (Ĉeĥio)  
POTÍŠKA Ivan (Ĉeĥio)  
POTÍŠKOVÁ Dagmar (Ĉeĥio)  
ŠVUBOVÁ Andrea (Ĉeĥio)  
TURKOVÁ Margita (Ĉeĥio)  
XU Xiaonan (Ĉinio)  
NIEMANN Jan Uldal (Danio)  
NIEMANN Lene (Danio)  
DARDENNE Christian (Francio)  
DEQUIDT Therese (Francio)  
RUEL Line (Francio)  
VIGNAUD Laurent (Francio)  
BRANDENBURG Guido  
(Germanio)  
EHRlich Bodo (Germanio)  
BARCSA András (Hungario)  
BAKACSI Daniel (Hungario)  
KISÉrdi Imola (Hungario)  
TORNILLO Vito (Italio)  
HINŠT Zlatko (Kroatio)  
MILIĆ-ŠTRKALJ Ksenija (Kroatio)  
KARPOVAS Aleksejus (Litovio)  
NASTARAVICIUTE Asta (Litovio)  
SCHAVEMAKER Gerry  
(Nederlando)  
BIADACZ Danuta (Pollando)  
GAJEK Halina (Pollando)  
GLOGOWSKA Krystyna (Pollando)  
GREGOROWICZ Józefa (Pollando)  
GREGOROWICZ Małgorzata  
(Pollando)  
GRUSZKA Aleksandra (Pollando)  
KARCZEWSKA Elżbieta  
(Pollando)  
LIBNER Wiesław (Pollando)  
OSŁOŃSKA Urszula (Pollando)  
POMORSKA Teresa (Pollando)  
RADOŁA Halina (Pollando)  
REWERS Ewa (Pollando)  
STEFANŃSKI Jerzy (Pollando)  
SZEWCZYK Barbara (Pollando)  
SZUBRYCZYŃSKA Grażyna  
(Pollando)  
ŚMISTEK Zofia (Pollando)  
ALDESIU Ioana Cristina (Rumanio)  
BRADLER Mariana (Rumanio)  
GIUHAT Rodica (Rumanio)  
TIRON Elena (Rumanio)  
TODOR Rodica (Rumanio)  
TUDORACHE Emil (Rumanio)  
TUDORACHE Mariana (Rumanio)  
BALÁŽ Peter (Slovakio)  
FAJTH Lubomír (Slovakio)  
FEIFIČOVÁ Magdaléna (Slovakio)  
MIKULOVSÁ Lucia (Slovakio)  
PETRÍK Pavol (Slovakio)  
RACLOT Théophile (Slovakio)

kaj ses pluaj, kaŝitaj partoprenantoj, entute 78 personoj el 14 landoj

## INTERNACIAJ FERVOJISTAJ ESPERANTO-KONGRESOJ

| n-ro | loko (ŝtato)                | jaro | n-ro | loko (ŝtato)                                    | jaro |
|------|-----------------------------|------|------|---|------|
| 1-a  | Aarhus (Danio)              | 1949 | 42-a | Hamar (Norvegio)                                | 1990 |
| 2-a  | Salzburg (Aŭstrio)          | 1950 | 43-a | Olomouc (Ĉeĥoslovakio)                          | 1991 |
| 3-a  | Parizo (Francio)            | 1951 | 44-a | Munster (Germanio)                              | 1992 |
| 4-a  | Lindau (F. R. Germanio)     | 1952 | 45-a | Cervia (Italio)                                 | 1993 |
| 5-a  | Utrecht (Nederlando)        | 1953 | 46-a | Krems (Aŭstrio)                                 | 1994 |
| 6-a  | Verona (Italio)             | 1954 | 47-a | Pécs Hungario ( )                               | 1995 |
| 7-a  | Zuriko (Svislando)          | 1955 | 48-a | Den Haag (Nederlando)                           | 1996 |
| 8-a  | Stockholm (Svedio)          | 1956 | 49-a | Košice (Slovakio)                               | 1997 |
| 9-a  | Rijeka (Jugoslavio)         | 1957 | 50-a | Aalborg (Danio)                                 | 1998 |
| 10-a | Aarhus (Danio)              | 1958 | 51-a | Le Mans (Francio)                               | 1999 |
| 11-a | Linz (Aŭstrio)              | 1959 | 52-a | Budapest (Hungario)                             | 2000 |
| 12-a | Helsinki (Finnlando)        | 1960 | 53-a | Tábor (Ĉeĥio)                                   | 2001 |
| 13-a | Barcelona (Hispanio)        | 1961 | 54-a | Plovdiv (Bulgario)                              | 2002 |
| 14-a | Budapeŝto (Hungario)        | 1962 | 55-a | Dresdeno (Germanio)                             | 2003 |
| 15-a | Stoke-on-Trent (Britio)     | 1963 | 56-a | Sopron (Hungario)                               | 2004 |
| 16-a | Brussel (Belgio)            | 1964 | 57-a | Braŝov (Rumanio)                                | 2005 |
| 17-a | Hamar (Norvegio)            | 1965 | 58-a | Shànghǎi (Ĉinio)                                | 2006 |
| 18-a | Utrecht (Nederlando)        | 1966 | 59-a | Paris (Francio)                                 | 2007 |
| 19-a | Fulda (F. R. Germanio)      | 1967 | 60-a | Poznań (Pollando)                               | 2008 |
| 20-a | Varna (Bulgario)            | 1968 | 61-a | Trieste (Italio)                                | 2009 |
| 21-a | Avignon (Francio)           | 1969 | 62-a | Sofia (Bulgario)                                | 2010 |
| 22-a | Rimini (Italio)             | 1970 | 63-a | Liberec (Ĉeĥa Respubliko)                       | 2011 |
| 23-a | Maribor (Slovenio)          | 1971 | 64-a | Herzberg am Harz (Germanio)                     | 2012 |
| 24-a | Lugano (Svislando)          | 1972 | 65-a | Artigues-près-Bordeaux (Francio)                | 2013 |
| 25-a | Aarhus (Danio)              | 1973 | 66-a | San Benedetto del Tronto (Italio)               | 2014 |
| 26-a | Tarragona (Hispanio)        | 1974 | 67-a | Kunming (Ĉinio)                                 | 2015 |
| 27-a | Villach (Aŭstrio)           | 1975 | 68-a | Varna (Bulgario)                                | 2016 |
| 28-a | Skellefteå (Svedio)         | 1976 | 69-a | Colmar (Francio)                                | 2017 |
| 29-a | Swanwick (Britio)           | 1977 | 70-a | Wrocław (Pollando)                              | 2018 |
| 30-a | Romo (Italio)               | 1978 | 71-a | Málaga (Hispanio)                               | 2019 |
| 31-a | Turku (Finnlando)           | 1979 | 72-a | Frankfurt am Oder – Słubice (Germanio/Pollando) | 2021 |
| 32-a | America (Nederlando)        | 1980 | 73-a | Beroun (Ĉeĥio)                                  | 2022 |
| 33-a | Regensburg (F. R. Germanio) | 1981 | 74-a | Antwerpen (Belgio)                              | 2023 |
| 34-a | Balatonfüred (Hungario)     | 1982 | 75-a | Strasbourg (Francio)                            | 2024 |
| 35-a | Oostende (Belgio)           | 1983 | 76-a | Žilina (Slovakio)                               | 2025 |
| 36-a | Slancev Brjag (Bulgario)    | 1984 | 77-a | (Serbio)  | 2026 |
| 37-a | Pécs (Hungario)             | 1985 |      |   |      |
| 38-a | Skopje (Jugoslavio)         | 1986 |      |   |      |
| 39-a | Katowice (Pollando)         | 1987 |      |   |      |
| 40-a | Perpignan (Francio)         | 1988 |      |   |      |
| 41-a | Salou (Hispanio)            | 1989 |      |   |      |